

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando

Esperantobladet

Elokuu ♦ Aŭgusto

4/1999



E-aranĝoj ĝis la jaro 2001, p. 14-17

Esperantolehti

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ esperantolehti@esperanto.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; (050) 5829 248; työ/laboro: (03) 249 4313

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Jukka Pietiläinen*

Nyyrikintie 4 H 47, 33540 Tampere. ☎ (03) 261 7871 ✉ jukka.pietilainen@esperanto.fi

Sekretario/Sihtööri: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Anna-Liisa Ali-Simola, Friskinkatu 2 A 33, 20360 Turku. ☎ (02) 238 7767

Kimmo Hakala, 72300 Vesanto. ☎ (017) 648 831 ✉ khakalat@nettilinja.fi

Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609

Anna Ritamäki, Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ aritamak@ra.abo.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Jussi Jäntti, Huuhankatu 14 B 8, 70600 Kuopio. ☎ (0400) 859 641

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245

Ritva Sabelli, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902 ✉ ritva.sabelli@sfs.fi

Rahastonhoitaja/Kasisto: *Antti Mikkola*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Toimisto/Officejo: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Ĉu esperantologiaj retstudoj iam?

La Malferma universitato de Helsinko ofertas retkursojn, en kiuj oni povas konsultiĝi sub la gvido de universitata instruisto, partopreni en diskutekzercoj kaj ekzameniĝi tute ĉe propra komputilo. La studentkandidato povas eĉ aliĝi al kursoj kaj tiel al la Malferma universitato de Helsinko en la retadreso: <www.avoin.helsinki.fi>. Ankaŭ la studentasocio en la Malferma universitato de Helsinko havas ligilon sur la sama TTT-paĝo por aliĝo. Tiel senpenan aliĝadon kaj studadon mia generacio povis nur prirevi en la sepdekaj jaroj. Por buĝeto de plejmulte malriĉaj studentoj tiatipa malrigida formo de universitato signifas ŝparojn. La studento ne devas elspezi al vojaĝoj studloken kaj ofte ankaŭ la studmaterialo troviĝas en la Reto. Interaktiva kunlaboro kun la instruisto faras la studadon pli aktiva ol la antaŭa sidado en lekcihalo. Oni eĉ faras antaŭ kurso studplanon, kadre de tiu la studento horaras sian ĉiutagon.

Multaj esperantistoj ofte scias nur malmulton ekzakte pri tio, kion la lingvo Esperanto kaj Esperanto-movado povas oferti al ne-esperantisto. Multkaze tiuj scioj estas en la vesto de mitoj aŭ simpligitaj reklamsloganoj. Ankaŭ ordinaraĵoj esperantistoj bezonas pripensitajn, sciencajn sciojn pri nia afero. Speciale nun, kiam nia movado sub la Kampanjo 2000 estas iom malfermiĝanta al

ekstera mondo. Ankaŭ funkciuloj de lokaj E-kluboj devas havi profunde studitajn sciojn pri Esperanto kaj nia movado en kontakto kun lokaj aŭtoritatuloj. Kiel finno mi ne pensas, ke studoj en universitato aŭ malferma universitato estas nur por personoj, kiuj havas salajritan E-postenon aŭ kiuj instruos Esperanton. Esperantologiaj studoj estu posedaĵo demokratie de ĉiu esperantisto, kiu havas intereson profundigi siajn pensojn, sciojn kaj ideojn pri nia afero.

Esperantologion oni instruas universitate en Nederlando, Pollando, Usono, Ĉinio kaj Hungario. Estus donaco al tuta esperantistaro, se tiuj institutoj aranĝus internacian malfermuniversitatan retinstruon ekzemple pri baza E-literaturo, scienca E-gramatiko kaj historio de Esperanto kaj aliaj planlingvoj. Ofte tiajn kursojn partoprenas homoj, kiuj havas nur ĝeneralan intereson kaj ne volas ekzameniĝi je universitata grado por kvalifiko en iu profesio. Al pligrandigo de vidpunkto je jam konata afero tiuj unuopaj ekzamenitaj kursoj sufiĉas. La aranĝado de tiutipa internacia retinstruado estas devigo al tiuj institutoj, kiuj jam havas esperantologiajn studojn en programo. Retkursoj nur pligrandigus ilian programon. Mi pensas ke el nenio tiuj kursoj ne kreigeblas.

Aimo Rantanen

Lingva situacio en Eŭropa Unio

Lastatempe ni povis legi en tagaj ĵurnaloj pri nova episodio en la lingva aplikado de Eŭropa Unio: Germanio kaj Aŭstrio decidis bojkoti kelkajn EU-kunvenojn pro tio, ke la germana ne estis uzata kiel interpretata laborlingvo dum ili.

Nia ĉefministro Lipponen poste eksplikis, ke Finnlando kun Svedio intencas proponi, ke poste restu nur unu laborlingvo, la angla.

La okazinta estas tre klara ekzemplo pri tio, kiel politikistoj solvas problemojn. Surbaze de la traktatoj de EU la egaleco de la uniaj lingvoj estis grave minacata – nur pro tio, ke ne troviĝis sufiĉe da spaco por interpretistaj budoj. Tiusence la reago de la germanlingvaj landoj estis tute rajtigata.

La tendenco al malpli multaj laborlingvoj en EU estas ankaŭ en si mem saĝa, sed laŭ nia opinio neniu homo, kiu sufiĉe konas lingvajn aferojn kaj internacian politikon, povas kredi je unu sola nacia lingvo kiel laborlingvo en internacia organizaĵo. Kvankam Svedio (kio ne estas kredeble) kunlaboras kun Finnlando kiel lando, kiu oficiale

volas subiĝi al la hegemonio de angla-lingvanoj, ni certas, ke la propono de nia ĉefministro neniam povus ricevi la subtenon de ekz. Germanio, Francio, Italio kaj Hispanio, kio estus necesa por akceptigi ĝin.

Kvankam ni scias, ke tradukado kaj interpretado en EU kaŭzas enormajn elspezojn kaj laboron, ni esperantistoj ne povas akcepti la metadon de iu ajn unia lingvo antaŭ iu ajn alia. Tio estas ankaŭ kontraŭ la spirito de Deklaracio pri homaj rajtoj. Kiam Finnlando ĝis nun klopodis montri sin modela lando, kiu obeas ĉiun alineon de ĉiuj direktivoj de EU, estas malĝusta maniero nun kiel prezidanta lando montri sian povon atakante unue kontraŭ la principo de lingva egaleco en la unio. Tio ne donas bonan imagon al la aliaj landoj, eble nur pli ridindigas Finnlandon.

Mi esperas, ke esperantistoj en EU sukcesus kune kaj kun UEA reagi kontraŭ tiaj elpaŝoj.

Jukka Laaksonen

Raikas ja rohkea Helmi-Poro -projekti

Taivalkosken kunnan Metsäkylällä on vaka aie pitää itsensä asuttuna mm. matkailun ja esperanton avulla. 1.8.1999 Horsman tuulimyllyn luona korkealla vaaralla oli juhlavissa maisemissa kotiseutujuhla, ns. Myllyjuhla, jossa noin 100 kyläläiselle esiteltiin, mitä esperanto on ja miten se liittyy EU:n tukemaan Helmi-Poro -projektiin. Projektissa on mukana myös Pudasjärvi ja

Linattijärvi. ”Helmi” viittaa Korvuanjoen hyödyntämiseen melontareittinä ja sen helmisimpukkakannan elvyttämiseen. ”Poro” viittaa alueen porotalouteen, vaellusreitteihin ja pohjoisen metsäluonnon matkailukäyttöön. Sitomalla esperanton ja Helmi-Poron yhteen saadaan ainoalaatuinen tuote, jota on jo pohjustanut O. Bullerin, R. Dobryzýnskin ja J. Heikkisen vuonna 1991 teke-

Saluto al la malkovra festeno de la memorstono de Joel Vilkki

Hyvät kutsuvieraat, arvoisat naiset ja herrat. Suomen Esperantoliiton puolesta, voimatta kuitenkaan osallistua tilaisuuteenne haluan esittää teille lämpimän tervehdykseni sekä sydämelliset kiitokseni varsinkin Someron kaupungille ja Somero-seuralle erinomaisesta ideasta kunnioittaa rehtori Joel Vilkin työtä. Vilkki on edelleenkin eräs suomen tunnetuimmista esperanton käyttäjistä, ihminen, joka työskenteli vuosikymmeniä ahkerasti tehdäkseen esperanton ja sen pohjana olevan kansainvälisen ystävyyden aatteen tunnetuksi oppilailleen, kollegoilleen ja kanssaihmisilleen.

Maailmanlaajuisessa esperantistien joukossa Somero on Vilkin ansiosta tunnetuin yksittäinen paikkakunta Suomessa vielä yli 30 vuotta hänen kuolemansa jälkeenkin. Muistuttakoon tämä paljastettu muistomerkki ja Joel Vilkin kirjasto meitä ja tulevia polvia lämminsydämisestä, ahkerasta ja aatteilleen uskollisesta ihmisestä.

Estimataj honoraj gastoj, gesinjoroj. En la nomo de Esperanto-Asocio de Finnlando, ne povante mem ĉeesti, mi sendas varmajn salutojn al vi kaj elkorajn dankojn aparte al la urbo Somero kaj Somero-societo pro la bonega ideo montri honoron al rektoro Joel Vilkki. Joel Vilkki estas unu el la plej konataj finnlandaj esperantistoj, homo, kiu multjare kaj diligente laboris kaj faris la internacian lingvon kaj ties ideon pri internacia amikeco konata al siaj gelernantoj, kolegoj kaj konatuloj.

Inter la tutmonda esperantistaro Somero estas pere de Vilkki la plej konata unuopa loko en Finnlando ankoraŭ nun, post pli ol 30 jaroj de lia morto. La starigita memorstono kaj la libraro de Vilkki memorigu nin kaj estontajn generaciojn pri homo varmkora, diligenta kaj fidela je siaj ideoj.


Tampereella 26.7.1999

*Jukka Laaksonen
puheenjohtaja*

mä 25-min. video ”Reveno al Finnlando”.

Metsäkylästä oli 2 opiskelijaa Tampereella esperanton kesäkurssilla Helmi-Poro-projektin lähettiminä. He antavat innokkaan panoksensa Helmi-Poro -projektiin. Kunnan yläasteelle koetetaan saada esperantokurssi ja aikuisille iltaopetusta. Alustavasti heillä on käytössään Mazi-video.

R.P.




Uusi hanke maailman kouluihin

Esperanto-opettajien kansainvälinen liitto ILEI on luonut hyvät mahdollisuudet tutustua toisten maiden lapsiin ja nuoriin ja heidän elämäänsä. Hankkeen nimi on Interkulturo ja sen toteuttamisessa on mukana Rooman 3. yliopiston opetustieteen laitos ja valvojina on osallistuvien maiden yliopistojen tiedemiehiä ja professoreita.

Interkulturo-hanke pyrkii suomaan eri maiden koululaisille mahdollisuuden tehdä yhteistyötä ikään kuin he olisivat samassa koulussa. Tämä ”sama koulu” löytyy jo nyt internetistä. Oppilaitten työ siellä alkaa syyskuussa -99 ja jatkuu vuoden 2001 elokuuhun. Mukana on luokkia noin 30 maasta ympäri maapalloa: Suomen Lapista, Patagoniasta, Japanista, Nepalista, Kanadasta,

Togosta... Koulun esperantonkielisenä nimenä on *Kvazaŭa Lernejo Tibor Sekelj** ja suomenkielisenä *Tibor Sekeljin virtuaalikoulu*. WWW-sivut on rakentanut suurimaksi osaksi ILEI:n puh.joht. Mauro La Torre, mutta tästä eteenpäin oppilaat itse rakentavat niitä ja päättävät niiden sisällön. Koulun kieleksi on valittu esperanto merkinä siitä että kansat ja kulttuurit ovat tasa-arvoisia ja koska se yksinkertaisuutensa ja säännöllisyytensä ansiosta on kohtalaisen nopea oppia. Jo puolen vuoden kuluttua oppilaat toivottavasti käyttävät sitä yhteydenpidossaan. Oppikirjoiksi opettajat eri maissa saavat valita mitä vain, mutta koulu suosittelee kirjoja *Tendaraj tagoj*, *Okuloj* ja *Mazi en Gondolando*.



Virtuaalikoulussa on ”luokkahuoneita”, joissa on luokkalaisten kuvat, lukusali, näyttelyhalli ja kirjasto, joissa voi tutkia oppilaiden tekemiä lehtiä ja muita töitä, nuorten oma ilmoitustaulu ja kielistudio, jossa voi treenata esperanton taitoaan. Koulussa liikutaan tietysti useimmiten tietokoneen hiirellä.

Parin vuoden kuluessa hankkeeseen osallistuvat lapset ja nuoret oppivat vertailemaan toinen toistensa elinoloja, ilmaisutapoja ja näkemyksiä. Heidän maailmankuvansa tarkentuu ja monipuolistuu maantieteellisesti ja kulttuurillisesti, ja he pystyvät ainakin jossain määrin vapautumaan itsekeskeisestä maailmankatsomuksesta.

Tämä kaikki lähtee alkuun pienin, konkreettisin askelin: käsitellään päivän ateriota kunkin perheessä ja koulussa, puhutaan ruuan tuottamisesta eri maissa, maanviljelyksestä. Toiset ottavat aiheeseen viestinnän eri muodot omassa ympäristössään. Voidaan tutustua kieliin, tervehdyksiin ja kussakin maassa käytettyihin etunimiin. Jotkut oppilaat kertovat maansa juhlista, perinteistä tai vaikkapa kalenterista, jotkut toiset taas säästä, vaatteista ja muodista. Joillekin paras aihe on eläimet, niin koti- kuin villi- ja turkiseläimet tai ravinnoksi käytetyt. Harastustensa mukaan voi valita muitakin aiheita: musiikki, elokuvat, taide, ammatit. Samaan aikaan vapaaehtoiset opettajat ko-

koavat oppilaita varten perustiedot kustakin maasta ja toimivat postinvälittäjinä sellaisille luokille, joilla ei ole käytössään internettiä ja/tai tietokoneita.

Interkulturo-hankkeen tueksi on perustettu UEA-tili, jonne ILEI:hin kuuluva Suomen osasto ELFI lahjoitti avaussumman onnitteluna 50 vuotta täyttävälle Esperanto-opettajien kansainväliselle liitolle.

*M. La Torren tiedotteen pohjalta
Raita Pyhälä, ELFI*

*Tibor Sekelj oli jugoslavalainen tutkimusmatkailija (1912-1988), joka tutustui kaukaisten seutujen oloihin ja kansoihin. Hän asui mm. 15 vuotta Etelä- ja Keski-Amerikassa. Hänen kirjojaan on julkaistu 20 kielellä. Hän oli myös elokuvaohjaaja, museon johtaja ja kansainvälisen maantieteellisen seuran puheenjohtaja. Jos haluat nähdä tarkemmin, mitä virtuaalikoulussa tehdään, niin poikkea sinne heti osoitteeseen <http://lps.uniroma3.it.kler>. Napsauta pääovella ja pääset Neuvontaan, josta saa tietoja muillakin kielillä kuin esperantoksi.

ILEI:n kotisivuilta näkee mm. missä kaikkialla maailmassa esperantoa opiskellaan, osoite <http://www.uniroma3.it/lps/esp.ilei>, mutta Suomen tiedot siellä ovat kohdassa ”Suomujo”.

Kara lando havas multajn nomojn

En julio -99 deko da seriozaj esperantistoj interdiskutis pri la nomo de nia lando en la interreto. Aperis pluraj alternativoj por la kutima ”Finnlando”, nome Finnlando, Fin(n)-io, Fin(n)ujo, Suomio, Suomujo kaj videblis

eĉ propono pri Fenujo, Fenio, Fenlando. Mi ne plu scias, kiel skribi mian adreson kaj en kiu lando mi loĝas.

*Tute konfuzite
Saliko*

Finfine vivhistorio de William Auld

William Auld. 75 jaroj.
Aŭtobiografio, Poemoj, Bibliografio.
Redaktis: Aleksander Korĵenkov.
Jekaterinburg: Sezonoj 1999.
48 paĝoj + 8 fotopaĝoj (17 fotoj).
Prezo 4 eŭroj.

Legante "La pajleroj kaj stoploj" de William Auld, mi pensis, kia persono vere la aŭtoro estas. Mi ŝatas lian sekan humursenton literaturistan, min impresas lia majesta leganteco de esperanta kaj nacilingva literaturo, mi admiras lian stilon majstran. Ŝajnas, ke li verkis pri ĉio kio estis kaj estas esenca en nia kulturo. Ne estas mia eraro, ke mi ne multon sciis pri la personeco William Auld. En la "Prefaco" de la libreto "William Auld. 75 jaroj" la aŭtoro konfesas, ke li pensas "esti malakurata korespondanto kaj kiel homa karaktero sufiĉe seninteresa", kiu "ne povas ripozi en paco, se li sciis, ke seriozmienaj esplorantoj trafos liajn aferojn – leterojn, taglibrojn, poemojn, artikolojn".

Dum la 84a Universala Kongreso en Berlino la Esperanta PEN-centro decidis en sia kunveno proponi denove William Auld kiel Nobel-premion en literaturo. Ĝusta elekto ricevi tiun omaĝon. Lastan fojon la komitato por elekto de Nobel-premiitoj en literaturo plendis pri tio, ke la verkoj de William Auld ne haveblas en la sveda. Facile ŝanĝebla afero. La libreto "William Auld. 75 jaroj" havas specimenojn el poemoj de la aŭtoro. Tiel ĝi estas por novulo enkonduko en la legadon de la verkaro de Auld. Plaĉa enkonduko.

AR

Viileri

Supra nomo apartenas al la nova kompaktdisko de la juna kanteloludisto **Timo Väänänen**. Li estas studinta en la departemento de la popolmuziko en Sibelius-Akatemia, kaj tiu ĉi disko estas la finverko de liaj studoj. Timo Väänänen estis elektita kiel la juna artisto de Finland Festivals en la jaro 1997, kaj li estas doninta koncertojn kaj en kaj eksterlande. Li ludas kantelon en popolmuzikensembloj Loituma kaj Á tre, kaj antaŭ sia solverko li estas ludinta jam sur kvar aliaj popolmuzikdiskoj. **Viileri** estas bonega ekzemplo – unue pri la alta arta nivelo de la artisto mem, kaj due pri la eblecoj de kantelo en ludado de diversaj muzikstiloj.

Kial la verko estas speciale interesa el la esperanta vidpunkto? La disko **Viileri** enhavas CD-ROM-parton, kiu rigardeblas per komputilo (per Windows 95, aŭ per Macintosh 7.1 aŭ pli malfrua versio). Tiu ĉi multimedia parto donas informojn pri 11 komponaĵoj de la disko kaj pri kantelo en 9 diversaj lingvoj: en la finna, angla, germana, franca, japana, esperanta, estona, latva kaj litova lingvoj. Pri tradukoj zorgis 12 tradukistoj; esperantlingvan tradukon estas farinta Harri Laine.

El la komponaĵoj la kvar unuaj, *La Etaj Petoluloj* (de Otto Hotakainen), *Valso de Blinda Kalle*, *Polko de la Tuta Mondo* kaj *Hambo* reprezentas pelimanni-stilon, kiu apartenas al la pli nova tavolo de la tradicia popolmuziko. Pecoj kiel *La Preĝejaj Sonoriloj* kaj aliaj verkoj por eta kantelo reprezentas la pli malnovan flankon de la popolmuziko, tn. kalevala-muzikkulturon. Al *Kerenski*-peco donis inspirojn rusa gusli-



Irma Heikkilä

Omaĝo al Irma Heikkilä

Dum la 80-a jarfesto Steleto memoris sian multjaran asistanton. Kiel laŭdon pro longa, sindona kaj merithava laboro la estraro de la finna Federacio de Vidhandikapitoj (Näkövammaisten Keskusliitto) laŭ peto de Steleto aljuĝis al Irma Heikkilä la arĝentan honorsignon. Bedaŭrinde ŝi ne povis ĉeesti la feston, ŝi ricevos la honorsignon pli poste.

Irma Heikkilä senpage redaktis kaj legis Sonrevuon kaj sindone estis je la dispono de Steleto en aliaj surbendigaj taskoj. Ŝi surbendigis ekzemple lernolibrojn de Esperanto kaj dum lastaj jaroj legis referaĵojn el protokoloj de la komitato de UEA. Dum 20 jaroj Irma admirinde prizorgis la informadon al vidhadikapitoj.

Kiel individua membro de UEA kaj EAF kaj kiel aktiva esperantisto ŝi havas la plej bonajn eblecojn por utiligi diversajn informfontojn. En ŝi unuigas kiel ideala maniero la vastaj scioj pri esperanta movado, bona lingvoscio kaj klara prononcado same kiel sindona perado de ŝiaj kapabloj al vidhandikapitaj esperantistoj.

Dankeme kaj dezirante inspiron kaj fortojn en la Esperantujo!

Ritva Sabelli

ludilo. *Kanto* estas ludata per parenca latva muzikilo, kokles.

Viileri estas publikigata de Finlandia Records, kaj ĝi apartenas al la surdiskiga serio (numero 20) de la departemento de la popolmuziko de Sibelius-Akatemia.

Viimeinen mahdollisuus ilmoittautua syyspäiville!

EAF: n Syyspäiviä vietetään 4.-5. syyskuuta 1999 Turun saaristossa. Jos olet aikeissa osallistua niihin, alkaa olla viimeinen tilaisuus. Ilmoittautumismaksu on nyt 120 mk. Syyspäiväpaketti maksaa 360 mk. Lisäksi on mahdollisuus osallistua bussikuljetukseen Jyväskyläs-

tä (200 mk) tai Tampereelta (100 mk). Myös muualta Jkl-Tre-Tku -linjalla otetaan kyytiin, mutta asiasta pitää ilmoittaa erikseen. Tee pikainen ilmoittautumisesi Päivi Saariselle, puh. (09) 813 3217, tai s-postitse: *sekretario@esperanto.fi*

Vojaĝraporto de la Rimina IJF

La ĉi jara Internacia Junulara Festivalo okazis en Bellaria, en proksimeco de Rimini, fama ferioŭrbo ankaŭ por multaj finnoj. Ni alvenis Italujen jam du tagojn antaŭ la komenco de IJF, ĉar ni volis sperti Bolonjon dumvoje. Ni havis eblecon konatiĝi kun lokaj samideanoj kaj viziti la esperanto-klubon “Achille Tellini“. Signoro Mario Amadeo, la ĉefdelegito de UEA en Italio volonte ciceronis nin tra la malnova parto de la urbo. Ĉie estis videbla riparado de malnovaj konstruaĵoj. Bolonjo estas unu el la kulturaj ĉefurboj de Eŭropo en la jaro 2000. Renkontinte aliajn eksterlandajn esperantistojn, kiuj ankaŭ intencis vojaĝi al IJF, ni prenis saman trajnon al Rimino.

La IJF-ejo troviĝis en la hotelo Ambasciatori, inter multegaj aliaj samaspektaj hoteloj ĉe la marbordo. Ni estis verŝajne la unuaj uzantoj de nia ĉambro post la vintro ĉar la lito estis malvarma kaj malseketa. Feliĉe ni kunportis niajn dormosakojn, en kiuj ni dormis la sekvontajn noktojn. Mi partoprenis la interkonan vesperon, bedaŭrinde mi memoras vizaĝojn pli facile ol nomojn – nomŝildojn oni tamen uzis.

La sekvontan tagon okazis post oficiala inaŭguro duontaga ekskurso al San Marino. Vere interesa urboŝtato ĝi estis, propraetosa, rigardante la ĉirkauan mondon el sia montpinto. Nin gvidis la eksministrino de eksterlandaj rilatoj kaj ŝia ciceronado estis esperantigita. En la urbo loĝis almenaŭ unu samideanino, kiu pendigis la esperanto-flagon al la gardrelo de sia balkono. Ni fotografiis unu la alian. Ĉie estis videbla ke turismo estas grava metio por sanmarinanoj kaj troviĝis multe da souvenir- kaj alkoholaĵvendejoj.

Ni grimpis ĝis la plej alta kastelo, apud kiu troviĝis agrabla verda montarbaro, kion mia edzino multe ŝatis.

La AIS, akademio de internaciaj sciencoj okazigis tri studsesiojn en Bellaria. Karlo Minnaja prelegis pri la historio de esperanta literaturo kaj Renato Corsetti pri psikolingvistiko. Ambaŭ ege interesaj, mi kiel nova esperantisto rimarkis kiel malmulte mi sciis pri la originala esperanta literaturo. Nun mi nepre volas konatiĝi kun la poezio de Kaloscay. Je mia ĝojo mi havis neniujn malfacilaĵojn kompreni enhavon de prelegoj kaj povis ankaŭ konversacii kun ĉeestantoj. Mi konvinkiĝis pri la taŭgeco de Esperanto kiel ankaŭ scienca komunikilo.

Mia edzino partoprenis la bazan kurson de Esperanto, sed plendis ke la kurso iom suferis pro la alveno kaj deiro de lernantoj dume. La prelego de s-ro Corsetti pri psikolingvistiko kaj lingvoakirado interesis min, ĉar mi mem klopodas lerni la rusan lingvon.





Ŝajne infanoj kapablas tre rapide akiri novan lingvon uzatan de la ĉirkaŭaĵo eĉ se parencoj kontraŭas tiun lingvon. En IJF-ejo ludis kaj interbatalis kelkaj etaj denaskaj esperantistoj kiel vivantaj ekzemploj de lingvoakirado. Poste mi partoprenis ekzamenon kaj ricevis ateston de la kurso kun naŭ poentoj el maksimuma dek.

La tria AIS-studsesio estis pri ĉifrado kaj legitimado en komunikado de komputilaj retoj. Prelegis Reinhard Foessmeier, sed bedaŭrinde mankis tempo partopreni tiun studsesion, ĉar ni volis viziti la urbocentron de Rimini. Krom prelegoj la festivala programo estis multfaceta: oni ricevis instruadon en ĵonglado, masaĝado, en itala kaj rusa lingvoj. Oni povis aŭskulti paskan meson esperantlingvan kaj prelegojn. Ni spektis teatraĵojn en Esperanto, sed estis tro lacaj por ankoraŭ spekti la noktajn filmojn. Tage

dekkvingrada marakvo ofertis sian freŝigan sinon al laciĝinta festivalano. La turisma sezono ankoraŭ ne komenciĝis kaj sur la sablobordo troviĝis multe da spaco. Dum la tuta semajno funkciis gufujoj, la nefuma trankvila te-ejo (ne tre bone, ĉar kutime mankis gufujisto), libroservo, kafejo-trinkejo kaj diskoteko. Kelkaj samideanoj, kiuj loĝis en la unua etaĝo malbone dormis. En krokodilejo oni devis uzi iun alian lingvon ol Esperanton aŭ sian gepatran por paroli kun aliaj ĉeestantoj.

Italan kapuĉinon ni vere ĝuis. Ni kutime tag- kaj vespermanĝis en la apuda hotelo, mi ŝatis spageton sed kompatindaj vegetaranoj ricevis nur teleron da fromaĝo tagon post tago. Paske ni manĝis paskajn oveg-ojn kiel deserto, kutime glaciaĵon. En la fino la kelneroj jam parolis kelkajn frazojn esperantajn. En la multgenta tablo estis interese esplori kiel diferencas manĝkutimoj inter diversaj landoj. Ekzemple ni norduloj komencis per salato, sed italoj manĝis ĝin post la ĉefa manĝo. Mi estis avertita ke mia maniero verŝi vinon povus ege ofendi iun suditalon. Nun mi pli saĝas kaj verŝas vinon ĝuste.

La milito en Jugoslavio ĵetis sian ombron sur nia renkontiĝo kaj ekscitis nin ĉiuj, kiuj ĉiuvespere televidis senfinajn vicojn de fuĝintaj kosovanoj. Okazis diskutforumoj tage pri la milito, kaj oni sendis solidaran retpoŝton al jugoslavaj samideanoj. Nokte mi vidis lumojn de kelkaj militaviadiloj flugantaj super la Adria maro.

La internacia vespero finis la IJF-on kun ĝuindaj teatraĵoj, muzikaĵoj kaj komuna kantado. Ni adiaŭis niajn amikojn kaj ekvojaĝis hejmen frue en la sekvonta mateno.

Jukka Vaijärvi

Anja Karkiainen premiita

Post Vieno, Budapeŝto, Sviŝtovo kaj Beogrado la 5an Danuban E-rendevuon gastigis 4-6 junio 1999 Razgrad (Bulgario). DER-5 kaj la samtempa krea E-renkontiĝo Abritus'99 estis kunorganizitaj de la urba E-ista Domo de Kulturo (EDK) kaj LF-koop.

En la filharmonio oni ĝuis E-koncerton kaj premiadon de la laŭreatoj de EKRA-99. Anja Karkiainen el Finnlando gajnis kun Danka Delĉeva la duan premion per poemo "En mia mondo ena".

Sukcesa ekspozicio en Vammala 2.-3.7.

La Esperanto-ekspozicio kadre de Tagoj de la malnova literaturo en Vammala bone sukcesis. La standon de EAF vizitis pluraj dekoj da interesitoj, kiuj volis scii pri Esperanto kaj ties literaturo, diskuti pri lingvaj aferoj aŭ aĉeti librojn. Konklude la aranĝo estas certe partopreninda kvankam eble ne ĉiujare. Dankon pro la kunlaboro al Jussi Jäntti, Jorma Toropainen, Markku Saastamoinen kaj Terhi Laaksonen.

Jukka Laaksonen

Finnoj en la 84-a UK en Berlino

En la ĉefkunveno de IPTEA (poŝtistoj) la prezidanto Veikko Mäki-Luopa raportis, ke en lia hejmlando ekzistas plej multe da radiotelefonoj kompare kun la loĝantaro, nome 60 %.

Pri fakaj temoj en la 65a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj rilatis la kulturan servon de la Finna Blindulligo Raimo Tanskanen kaj influon de sociala kaso de

Eŭropa Unio al dungado de blinduloj Arvo Karvinen.

En la Belartaj Konkursoj la duan premion Ahn Song-san pri kanto ricevis Anja Karkiainen (teksto) kaj Vesa Pölkki (muziko) pro la kanto "Kiam la folioj flavas".

Pro krokodilemo oni devas pagi

En E-festivalo Aroma Jalto (Krimeo), la 1-9an de majo 99 en la ripozejo Niva, kien kolektiĝis ĉ. 60 partoprenintoj el Rusio, Ukrainio kaj Svedio. Organizantoj de la festivalo daŭrigis realigi la principon pri la monperlaboro pro la mal-krokodilado. Kiel estis promesita antaŭ la festivalo, 20 %-oj de sufiĉe granda organiza kotizo estis uzitaj por fondi monpremiojn al plej malkrokodilemaj gesamideanoj. Rezulte oni havis eblecon duonigi la elspezojn por loĝado kaj partopreno.

Interesa estas ukraina-svedia junulara projekto. Julja Hordjenko (Ukrainio) kaj Lovisa Gustafsson (Svedio) propagandas Esperanton kaj ĝiajn ideojn en junularaj grupoj. Dum tri monatoj (januaro-aprilo) ili laboris en Svedio kaj jam pasas agado en Ukrainio.

✉ Korespondi deziras

Ogu Innocent, 22-jara, kun finnlandaj esperantistoj, aŭ kun esperantistoj el najbarlandoj de Finnlando. Li ŝatokupas legi revuojn kaj ĵurnalojn, kutimas viziti historiajn lokojn, aŭskultas radioelsendojn (Pola, Aŭstria kaj Vatikana) kaj vizitas sportajn aranĝojn.

Ogu Innocent, Box 345 Nkwogwu, ABOH MBAISE L.G.A. Imo State, NIGERIA.

Hemmo Tietin elämäkerta

Eri puolilta Suomea ovat esperantistit alkaneet kirjoittaa muistitietoa edesmenneestä Hemmo Tietistä. Tulevaisuudessa julkaistavaa Hemmon elämäkerta varten pyydän lähettämään häntä koskevaa materiaalia: muisteluksia, lehtiartikkeleita ja vaikkapa kasetille koottua tietoa Aimo Rantaselle, os. PL2, 40801 Vaajakoski. Hemmo Tietin muisto ansaitsee perusteellisesti laaditun elämäkerran.

PSI 16. kerran St. Andreasbergissä

Huhtikuun 17.–24. pvä vietetään Kansainvälistä kevätviikkoa (PSI) St. Andreasbergissä, Harz-vuoristossa, teemalla ”Eurooppa 2000 – idän ja lännen sukupolvien yhteiselämää”. Tämä pääsiäistapaaminen, jonka järjestää Saksan esperantoliitto, on perinteinen koko perheen yhteenkokoontuminen. Ohjelmassa on keskusteluryhmiä ja luentoja, kursseja, kielikursseja aloittelijoille ja pitemmälle ehtineille sekä lapsille, Mazi-kurssi lapsille, kansallisten kielten pikakursseja, taidekäsityötä, vierailuja, elokuvatunti, tori, iltaohjelmaa, esimerkiksi ruotsalaisen Personen konsertti, sekä kahvila ja rupattelupaikka, koko päivän auki. Lähempiä tietoja saat Wolfgang Bohrilta, Johannes-Kirschweg-Str 11, D-53474 Bad neuenahr – Ahrweiler, Deutschland. PSI esitellään Internetissä: www.esperanto.de/psi S-postia voit lähettää: psi@esperanto.de



Tavataanko Himalajalla?

Nepalin Esperantoliitto järjestää 26.2–7.3. 2000 Katmandussa 3. Kansainvälisen Himalaja-tapaamisen, jonka aikana tutustutaan maan luontoon, kansaan ja kulttuuriin matkustamalla Katmandun ympäristössä Nepalin suuressa laaksossa, Pokharassa. Nelipäiväinen kiertopatikka Himalajan vuoriston juurella, lentomatka Ġomsomiin ja kumilauttasoutu Trišuli-joella kuuluvat oleellisina osina Himalaja-tapaamiseen. Nopeimmin saat tietoa tästä tapaamisesta s-postitse: sosierra@wlink.com.np

KIRJAUUTUUS!

Proverbaro – Nia Komuna Heredaĵo sisältää tuhansia sananlaskuja esperantoksi kaikkialta maailmasta. 202 sivua, nelivärikansi, piirroksia. Toimittanut ja kääntänyt Erkki Röntynen.

Hinta 87 mk + lähetyskulut 12 mk.

Kirjan voi tilata joko Suomen Esperantoliitosta, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki tai suoraan tekijältä, Törmäntie 1, 90830 Haukipudas, puh. (08) 5471 703. Kirjaa välittää myös UEA:n kirjapalvelu.

